

Komparate parametrojn en Fig. 3 kun la kalkulita meza amplitudo  $B_A = 0,1 \text{ rad}$  oni povas pruvi la teoriajn konsiderojn priskribitajn en la artikolo.

#### Literaturo:

Chrdle, P. (1974): NB 50 Automatic Diesel Plant. En: Czechoslovak Heavy Industry, N-ro 10/1974, Praha.

Uhlíř, I. - Vladař, J. (1975): Elektronický regulátor otáček s přímočinným akčním členem pro naftové motory. Acta polytechnica II, 1975, Praha

Uhlíř, I. (1980): Paralelní chod dielelektrických agregátů (Paralela funkciada de diselaj masinokombinajoj).

Kandidatscienca disertacia laboro. ČVUT Praha, FSI.

#### Ĉeĥa resumo:

Vliv kolísání síťové frekvence na chod synchronních motoru pohánějících velké setrvačné hmoty.

Článek ukazuje vliv dynamických změn frekvence elektrické rozvodné sítě na vybuzení kývání synchronních strojů spojených s velkými setrvačnými hmotami. Řeší maximální přípustnou velikost momentu setrvačnosti na hřídeli synchronního motoru s ohledem na kolísání síťové frekvence.

D-ro Ivan Uhlíř, docento ĉe Teknika Universitato en Praha, Fakultato de maŝinkonstruado, estro de la katedro de elektrotekniko.

D-ro Petr Chrdle, estro de privata konsultacia kaj eduka firmao KAVA-PECH, asociita docento de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino kaj ties senata sekretario.

Scienca kaj humanisma formo de la mondekkono kaj ideoj de la sintezo en la konscio de Anglio en la lasta triono de la XIX. jarcento.

A. A. Fedorov

Konata angla verkisto kaj sciencisto Charles Snow en sia verko "Du kulturoj" (1971) substrekis, ke por angla kapitalisma civilizacio – de la epoko de industria revolucio de la XIX. jarcento – unu el plej karakteraj trajtoj iĝas la kolizio inter "scienca kulturo" kaj humanisma kulturo. En angla socia konscio tiu kolizio iĝas aparte akra, sin transformante en profundan konflikton dum la lasta triono de pasinta jarcento, post la pariza komuno. Tio estis transira kaj kriza epoko en kultura vivo de la lando. Sangaj eventoj en Francio profunde influis la mondkoncepton de angloj dum sekvaj jaroj, kauxinte intensajn intelektajn sercojn kaj teoriajn projektojn de senperforta vojo al la plej justa kaj harmonia socio de estonto. Pli frue, en la 50–60aj jaroj, optimismaj esperoj estis ligitaj kun eminentaj atingoj en diversaj sferoj de la scienco, kaj oni esperis, ke la aŭtoritato de sciencaj socioj, konfirmita per famaj verkoj de H. Spencer, Ch. Darwin, Th. Huxley, povas solvi la fundamentajn problemojn de estado. En tiuj kondiĉoj pozitivisma metodologio, scienca evolua metodiko de Darwin, universala sociologia teorio de Spencer, tre larĝe disvastigis kaj de multaj vidpunktoj formis mondkonceptajn bazojn de la estetika agado kaj arta pensado. Anglaj agantoj de la arta kulturo iomgrade – pli au malpli – akceptis la konvinkon pri la ĉefa rolo de evoluo, de objektivaj interrilatoj inter homo kaj ĉirkauanta

mondo, kaj ankau la ideojn de unueco kaj multeco de diversaj vivformoj.

Tiamaniere por la plejmulto de sciencistoj la problemo de la kreo de objektiva mondvizio sur bazo de la scienca metodologio estis plene solvebla. En sia vico multaj artistoj pli kaj pli forte protestis kontraŭ la evidenta triumfo de la scienca kulturo. En la 1870-80aj jaroj la konflikteco kaj komplikeco en la ekkono de nuntempaj sociaj procezoj kontraŭstarigis la sciencan kaj la artan esploron de la vivo kaj de la homo. En la socia konscio plilarĝigas la tendenco, kiun oni nomis en angla scienca literaturo "ribelo kontraŭ pozitivismo" (R. Collingwood). Anstataŭ la ideoj de stabileco, historia progreso, evoluciismo, venas la konscio de dinamismo, nestabileco, transira karaktero de nuntempa epoko, kaj ĉio tio starigas sub demando la konceptualismajn ideojn bazitajn sur komprenebla, por ordinare konscio scienca bildo de la mondo.

Iĝis klare videblaj la signoj de la nova ĝenerala kultura situacio, kvankam la patoso de revizio kaj neado de la scienco ne kondukis al la radikala ŝanĝo de sciencaj metodologiaj bazoj. En praktiko ĝuste la estetika penso multe faris por reformuli de humanisma vidpunkto kelkajn aktualajn problemojn, kiuj ĉiam estis en la tagordo. Kreskis la polemiko pri la loko kaj signifo de la homo en nuntempa mondo. Generale akceptita pozitivisma koncepto pri la homo ĉiam malpli kontentigis kulturagantojn, ĉar en ĝi respeguliĝis la troestimo por biologiaj faktoroj en la pritakso de personeco kaj granda parto de indiferenteco por la spirita homa esenco, por ĝia originaleco kaj subjektiva neripetebla karaktero.

Lige kun tio ege interese estas la agado de Walter Pater, teoriisto kaj artsciinto, admiranto de Winckelmann kaj Goethe. Li estis unu el tiuj, kiu donis sian plej grandan

parton en la reorientiĝo de angla kultura konscio en la 1870-80aj jaroj. En 1893 aperis lia resuma filozofia libro "Platono kaj Platonismo", en kiu li ĝeneraligas siajn ideojn pri la sorto de Platono kaj platonismo en la jarcento de darvinismo kaj de sociologio de Spencer.

Kiel filozofo, adepto de angla agnostikisma tradicio, Pater insistis je pli konsekvenca relativismo en la ekkono kaj pritakso de objektiva mondo - kontraŭe al la pretendoj de la naturscienco por malkovro de absoluta vero. Pater ne neis, ke post la malkovroj en la sfero de anatomio, fiziologio, psikologio kaj darvinismo nia kompreno de la natura homa esenco multe pli riĉiĝis. Tamen, natursciencoj estas inklinaj al klasifikado kaj ĝeneraligo, rezulte perdiĝis la kompreno de pleneco kaj specifikeco de la vivo, de meripetebla homa ekzistado. Pater opinias, ke ne eblas vivi inter la subskriboj kun nomoj de floroj kaj imagi sin en ĝardeno. En la centro de sia kulturkoncepto li starigis la personecon, ne nur havantan larĝajn konojn, sed esence kapablan je profunda individua spirita agado en pleneca kompreno de la nuntempo kaj pasinto. Pro tio la idealo por Pater estis ne tiom sciencisto-eksperimentanto, esploristo, kiom "homo de kulturo", por kiu ekkono de la mondo iĝas proksima al la arta kreado. Li subtenis la aktualigon de kultura heredo, kiu devas havi plej gravan signifon por formado kaj autodetermino de la homo. Pater ligas siajn esperojn pri la venko de ekzistanta konflikto inter la scienca kaj arta formo de ekkono kun la reorientado de nuntempa personeco al la spirita, kulturaj kaj artaj valoroj.

Pater mem kliniĝis ne nur antaŭ la estetiko de germana klerigo, sed ankau li profunde estimis Platonon, kiel teoriiston de kulturo kaj arto, kio estis tute konforme al la alta aŭtoritato de greka filozofo en Anglio en la XIX.

jarcento. Por Pater la heredo de Platono estis baza scienca koncepto, kiu havas aktualan gnoseologian kaj humanisman sencon. En la kondiĉoj de profunde diferencigo kaj specialigo de diversaj flankoj de la spirita vivo ĝis ilia plena sektigo, la Platonismo estis konsiderata per Pater kiel pozitiva ekzemplo en la konsciaj streboj de la filozofia penso, atingi la sintezon en la kultura sfero.

Pater interpretis la heredon de Platono de kulturologia vidpunkto, kio estis kaŭzita per lia kompreno de la sociaj bazoj de Platonismo. Li vidis certajn analogiojn inter la socia situacio en antikva Grekujo de platonaj tempoj kaj Anglio en la fino de la XIX. jarcento. Pater pensis, ke la plej signifa verko de Platono estas "La Ŝtato", li opiniis, ke en tiu verko la greka filozofo protestas kontraŭ la pereiga centrifuga tendenco, kiu en certaj historiaj periodoj kaptas la homon kaj la socion. Li maltrankviligis pro malatento de la nuntempa scienco por la sorto de aparta personeco, li opiniis, ke ĝuste Platono montras la vojon por venki la krizon, kiu frapis la anglan socion kaj homojn en la XIX. jarcento. Pater volis konsideri Platonon kiel pensulon, kiu venkis historiismon neeviteblan por la sociologio de la XIX. jarcento en la solvo de problemo pri perfektigo de la socio kaj autoperfektigo de la homo. Al la "mekanika ludo de cirkonstancoj", kiu gvidis la nuntempan homon, Pater kontraŭstarigas la platonismon, kiel teorion de belo, kiu povas favore influi la homojn en iu ajn historia momento.

Pater opinias, ke Platono, kiel teoriisto de belo, evitis "malvarmsangan transcendentismon", kio permesas montri la individuan kaj spiritan aspektojn de lia vivkonstrua utopio "La Ŝtato". Pater aparte substrekis, ke Platono en la ekkonprocezo "kunigas kaj kunverŝas la materian kaj la spiritan" kaj tiamaniere okazas kunigo de la abstrakta, ideala kaj de la konkreta, sensa flanko pere de

la kompreno de ilia belo. Li opinias, ke en platonismo ĝuste la belo kreas necesajn bazojn por riĉeco kaj pleneco de intelekta kaj spirita vivo de la personeco. Pater insistas, ke la platonismo povas esti realigebla programo por transformado de la nuntempa socio kaj homo. Pro tio en la doktrino de Platono pri la belo li substrekis la ideon de "erotika supreniro" de la kompreno de videblaj flankoj de belo al la idealaj formoj de belo. Kompare kun la scienco de la XIX. jarcento, la allogeco de platonismo por Pater estis en tio, ke la homo, komprenante la belecon de la mondo, kunigas altan intelektan nivelon kun la senpleneco de la estadkompreno. Tiamaniere, opinias Pater, pere de doktrino de Plato pri la belo estas atingebla la harmonio inter "mikrokosmo" de homa ekzistado kaj la "makrokosmo" de ĉirkauanta mondo. Pater estis unu el la fondintoj de estetismo en la teorio de kulturo kaj humanismo en Anglio de lasta triono de la XIX. jarcento. Li anoncas la prioritaton de spiritestetika determinismo kiel plej grava kondiĉo en la formado de tutflanke evoluita harmonia personeco, kio signifas la krizon de malmolaj natursciencaj mondkonceptoj en la kompreno de personeco. En sia kultura programo Pater respondis al profundigantaj procezoj de izoleco, divido de laboro kaj diversaj sferoj de la spirita agado. La verkoj de Pater favoris la turnon de humanisma penso al la ideo de tutenhava kulturo kaj arta sintezo, kio estas karakteraj trajtoj de kulturo de la XX. jarcento.

Adreso de la aŭtoro: A.A. Fedorov  
Doktoro pri filologiaj sciencoj – Baŝkiria Ŝtata Universitato  
GUS 450077 UFA  
Str. Curjupa 102 – 43  
RUSIO – BASKIRIO